MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 3

MARTO 2020 Kol. 419/36

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Božena Němcová, Sekvojoj, Parolado de prezidanto, Komputiloj kaj mensoj, Preĝejo en Dohna

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Božena Němcová: la 200-a datreveno

Božena Němcová apartenas al la unuaj ĉeĥaj literaturaj aŭtoroj dum la Nacia Reviviĝo en la 19-a jarcento.

Božena Němcová naskiĝis en la jaro 1820 kiel Barbora Novotná, kaj post kelkaj monatoj ŝi ricevis la familinomon Panklová, ĉar ŝiaj gepatroj geedziĝis nur post ŝia naskiĝo. La gepatroj laboris en la kastelo, la patrino kiel lavistino, la patro kiel koĉero. Ekzistas spekulacio, ke Barbora povus esti bastardo de la princino Zaháňská. Ŝi kreskis en Ratibořice proksime al Česká Skalice kaj kiel infano ŝi estis influita de sia avino Magdalena Novotná.

En la jaro 1837 Božena edziniĝis kun Josef Němec, kiu laboris kiel financa oficisto. Ili havis kvar infanojn. En la jaro 1853 la plej aĝa filo Hynek mortis pro tuberkulozo. La geedzoj Němec fine de la kvindekaj jaroj volis divorciĝi, ĉar ilia kunvivado ne estis feliĉa ...

Ŝin arte influis du periodoj. La unua estis de la jaro 1842 ĝis la jaro 1845, kiam la familio loĝis en Prago kaj B. Němcová alligis kulturajn rilatojn kun gravaj homoj de tiu tempo. La dua periodo estis de la jaro 1845 ĝis la jaro 1848, kiam ili translokiĝis al Chodsko (sudokcidenta Bohemio), kio estis grava por B. Němcová rilate al kampara medio kaj ties tradicioj. En la kvindekaj jaroj ŝi loĝis en Prago, kiam ŝia edzo servis en slovaka parto de Hungario.
Kiam okazis geedziĝ-disiĝo, en la j. 1861, ŝi foriris al Litomyšl, sed pro grava malsano, antaŭ Kristnasko li forveturigis ŝin al Prago. Januare 1862 ŝi mortis kaj estis entombigita en la tombejo Slavín - Vyšehrad.

La verkaro de Božena Němcová

La plej grava literatura verko de Božena Němcová estas la libro „Avino“ kun la subtitolo Bildoj el kampara vivo. Ŝi finskribis ĝin en la jaro 1855. La libro „Avino“ priskribas impresojn pri kampara vivo kaj vilaĝajn kutimojn, familiajn rilatojn kaj naturajn sezonojn. Krom la „Avino“, Božena Němcová verkis multe da fabeloj, rakontoj, poemoj kaj gazetaraj artikoloj.

El Aktualně.cz

Krepusko de titanaj arboj.

Sekvojo (*Sequoia*) estas genro de la arbofamilio de cipresacoj, kun nur unu specio (*Sequoia sempervirens*) de konifera arbego, hejme en okcidenta Usono. La arbego estas tre longviva kaj povas iĝi pli ol 1 000 jarojn – la plej malnova estas eble 2 200 jaraĝa. La branĉoj havas pinglojn kvazaŭ en du plataj vicoj sur branĉoj, preskaŭ kiel ĉe taksuso. La arbo estas hejme en Usono, en Kalifornio kaj Oregono, kaj povas kreski ĝis la alto 104 m kaj 8,5 m de diametro. Ĝi estas kultivata por lignaĵarto kaj ornamo.

La nomo sekvojo estis donita omaĝe al la ĉeroko Sequoyah. La latina *sempervirens* signifas «ĉiamverda», malprecize.

La Sekvoja Nacia Parko estas apud la kalifornia pacifika marbordo proksime al la limo de Oregono. En la protektejo kreskas preskaŭ 50 procentoj de la naturaj arboj sekvojoj aŭ *Sequoia sempervirens*, nome plej alten.

Multaj sekvojoj en Kalifornia „Kanjono de sekvojoj kaj reĝoj“, unu parto de la nacia parko en montaro Sierra Nevada, estas endanĝerigitaj. Titanajn arbojn, iuj estas pli aĝaj ol tri mil jaroj,

detruas la bloko de influoj – sekeco, fajregoj kaj skolita kalamito.

Studmaterialoj de sciencistoj supozigas argumentojn, ke malapero de 28 sekvojoj detruitaj ekde la jaro 2014 kaŭzis ŝanĝojn de klimato. Sciencistoj konstatis, ke la atako de miloj da skolitoj mortigas sekvojojn tiom rapide kaj tiamaniere, kiel neniam antaŭe. Pli frue sekvojoj reviviĝis ekde radikoj, nun post la atakoj de la skolitoj, kiuj deponiĝas en la arbokrono, ili malprogresas direkte el la supro. Problemo, kiel savi la arbojn konsistas en la malspontana generado.

Tradukis el revuo Květy Pavel Nechvíle

PREZIDANTO DE EEU INTERPAROLIS KUN ANTAŬA ĜENERALA SEKRETARIO DE EŬROPA KOMISIONO

Mi havis bonan 40-minutan konversacion kun Martin Selmayr pasintsemajne (antaŭa Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Komisiono, nun ĉefo de la oficejo de la Komisio en Vieno). Ni komencis pri Eŭropa identeco, sed daŭrigis pri ebla rolo por Esperanto, kompreneble. Li montris grandan intereson – eĉ fotografis la libron de Ulrich Lins, “Die Gefaehrliche Sprache”, por mem mendi unu. Li demandis, ĉu mi pretas gvidi diskuton pri Esperanto en la Komisiono en Vieno, kaj komprenble mi konsentis. Li petis min sendi al li la tekston de la Eŭropa Himno en E-o, kaj tion mi faris. Li parolas tre bonan anglan, sed ni diskutis germane. Fine, li proponis, ke ni uzu “Du” (ci) unu kun la alia.

Seán Ó Riain

Komputiloj kaj mensoj

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Paŭlo Sergio Viana el Brazilo

Multaj milionoj da homoj en la tuta mondo portas en siaj poŝoj telefonaparatojn, kiuj funkcias kiel komputiloj kaj enhavas grandegan kvanton da utilaj (kaj neutilaj) informoj pretaj por tuja konsulto. En Brazilo, ili estas pli ol 200 milionoj da aparatoj, kaj tiu nombro plu kreskas. Kroma simila kvanto da surtablaj kaj porteblaj komputiloj montras, ke tiaj aparatoj reprezentas profundan intervenon en la vivo de moderna homo.

Ĉu tiu interveno estas bonfara aŭ damaĝa al nia menso? Ĉu ĝi influas nian memorkapablon, ekzemple? Ĉu ĝi influas aliajn

mensajn kapablojn? Ĉi tiun demandon oni faris al diversaj fakuloj.

Laŭ studo farita en Britujo, la senkriteria uzado de telefono kaj interreto nuntempe malpliigas la memorkapablon por freŝaj faktoj. Multaj homoj jam ne sukcesas memori la telefonnumeron de sia edzo aŭ edzino, aŭ de siaj filoj. Multaj homoj ne memoras eĉ sian propran telefonnumeron, ankaŭ ne siajn retadresojn, dokumentonumerojn kaj pasvortojn. Ĉar tiuj informoj troviĝas facile atingeblaj, tial la cerbo ne okupiĝas pri ili. Kaj tamen, telefonaparatoj povas panei.

Oni konsultis la brazilan neŭro-kirurgiiston Júlio Pereira pri tio. Li konsentis, ke tiaj teknologiaĵoj tute ŝanĝis iujn cerbajn kapablojn, sed ne ĉiam damaĝe. Ekzemple, rilate al alfabetigo de infanoj, oni ankoraŭ esploras la rezultojn. Eble la cerbo akiras iujn kuriozajn lertecojn: oni trovis, ke junuloj, kiuj kutime ludis per videoludoj dum sia infana aĝo fariĝis poste pli lertaj kirurgiistoj.

Uzado de telefonoj kaj komputiloj frue en la infana aĝo ja ŝanĝas la kapablojn de infanoj. Ili ne akiras iujn kapablojn, kiuj estis oftaj en antaŭaj generacioj, sed aliflanke ili gajnas aliajn. Ekzemple: aparatoj permesas, ke infanoj desegnu sur la ekrano, sed tiu ludo ne envolvas la saman lertecon de la manoj, kiu necesas por krajona desegnado. Sekve, certe oni devas kompletigi la uzadon de aparatoj per aliaj korpaj ekzercoj, por proponi al la cerbo aliajn vojojn por agado.

Rilate al maljunuloj, esploroj montras, ke kiam ili sin submetas al trejno por uzado de interreto, tiam ilia memorkapablo kaj

atentokapablo pliboniĝas, se oni komparas ilin kun ne konektitaj maljunuloj.

Tamen, estas pruvite, ke troa, konstanta konektiĝo al interreto kaj komputiloj estas streĉa kaj angoriga. Ĉe multaj personoj ĝi povas transformiĝi en teruran obsedon. Nepre necese estas flankenlasi la aparatojn de tempo al tempo kaj sin doni al liberaeraj korpekzercoj kaj socia kunvivado. Vivo plena kaj sana dependas de modereco kaj saĝa ekvilibro.

Sendis Liette Lêla

Preĝejo en Dohna, Germanujo

Dimanĉe estis pli granda koncerto en la preĝejo de Dohna. Tie estis 2 diversaj korusoj kaj tambura orkestro kaj mi kunestis kvankam tie la benkoj estas tre maloportunaj. Eble ili foje konstruis la ejon por nanoj.

Sed interese tie estas, ke en la ora kuglo sur la kirka turo estas skribaĵo en Esperanto el la jaro 1927. Mi iam loĝis en Dohna kaj en la jaro 1975 mi havis la eblecon deskribi la tekston kiam oni riparis la turon kaj ekspoziciis la enhavon de la globo.

Nuntempe estas vere interesa la enhavo kaj historia fakto. Tiutempe la instruisto, kiu skribis la tekston, ankoraŭ vivis kaj mi povis paroli kun li. Dohna tiutempe havis nur 4000 da loĝantoj kaj oni sciis ke mi estas esperantisto. Oni devis dikti al mi la vortojn, ĉar mi ne scipovis legi la tiel nomata malnov-germana skribmaniero (eble ĝi nomas sölderlin aŭ simile). Norbert Karbe, 11. 12. 2019

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.